What kind of physicians does our century need?

Considerations on the oath of Hippocrates in our time

(Oryg. Kiajn Medicinistojn Bezonas La Nuna Jarcento? aŭ pri la ĵuro de Hipokrato en la nuna tempo)

KUSTERS Ward

Flandra Esperanto-Ligo, Institucio Hodler je Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Abstract

As anything else medicine always evolves. Continually new diagnostic tests and devices are being introduced. Today genetic analyses, diagnostic microchips and robot-assisted surgery are in the main focus of interest. From time to time we even not only witness evolutions, but real revolutions. Of course from the moment on when we recognized that not ill-tempered gods or miasms but natural influences and microorganisms are responsible for the cusation of diseases, our way of thinking or the concept of making diagnoses and healing had to change. Over the centuries, however, the same priciples kept on guiding the actions of physicians: balance and respect.

Keywords: Hippocrates, Hippocratic oath, Galen, modern medicine, medical ethics

Corresponding Author: Ward Kusters, eduard.kusters@skynet.be

Nelonge post la anoncado de la IMEK-konferenco mi ricecevis inviton de mia universitato por alia konferenco pri la sama temo: "La kuracisto de morgaŭ" . La programo montris du temojn. Unue la ciferan medicinon aŭ pri la rolo de mikroĉipo en la homa korpo kun la celo preventi kaj kuraci malsanojn. Krome la problemojn de pricifera medicino: kion fari kun la amaso de datenoj. La danĝero ke la amaso de datenoj formos susuradon estos reala. Oni povas kompari tion kun aŭtotrafiko kie oni samtempe havas milojn da trafiktabuloj. La dua temo estis pri genetikaj testoj. Ĉu tio signifas minacon aŭ progreson por la homoj? Oni traktis la diversajn jurajn aspektojn. Mi iomete dubis. Ĉu la nova kuracisto estus speco de elektroinĝeniero, de statistikisto aŭ de kontisto? Ne, niaj pacientoj havas aliajn dezirojn. Lasu nin esplori la situacion en la pasinta kaj nuna tempo kaj poste klopodi malkovri la bezonojn por la futuro.

En la historio kaj versajne ankaŭ en nia tempo la homoj ne estas ĉiam pozitivaj pri kuracistoj. Voltaire (5) diris : "Kuracistoj uzas kuracilojn, pri kiuj ili malmulte scias por kuraci malsanojn pri kiuj ili ankoraŭ pli malmulte scias, de malsanuloj pri kiuj ili tute neniom scias". Ekzistis malfido. La demando restas: kio estas medicino? Ĉu medicino nur estas fratino de biologio? Ĉu ĝi estas arto aŭ scienco? Jam rapide oni diris: Medicino estas scienco aŭ ĝi ne ekzistas. Aliaj diris: "Medicino estas filozofio ĉar ĉiuj virtoj de la bona filozofo devas esti trovataj en la kuracisto: altruismo, zorgemo, modesto, respektiga ŝajno, seriozema, trankvila juĝo, sereneco, decidemo, pura vivmaniero, koncizemo, scio pri kio estas utila kaj necesa por la vivo, malaprobo de malbonaj aferoj, spirita libero de malkonfidoj, dediĉado al la dio" (7).

Longtempe la modelo de Galenos regis la mondo (3). Ĝi estis bazita sur la naturkoncepto de Pythagoras. La naturo ekzistas el 4 elementoj: fajro, tero, aero kaj akvo. Hipokrato kaj poste Galenos uzis la modelon por la homa korpo. La homa korpo konsistas el 4 likvaĵoj, kiuj devas esti en ekvilibro: Flava galo (fajro), Nigra galo (tero), Sango (aero) kaj Ŝlimo (akvo). La kuracisto devis restarigi la sanan ekvilibron de tiuj likvaĵoj. Tiu kernideo pri ekvilibro aperas en preskaŭ ĉiu kuracmetodo. La Ĉina medicino konas la ekvilibron inter la bazaj fortoj Yin kaj Yang kiuj daŭre moviĝas. La bona sano dependas de la bona ekvilibro inter tiuj fortoj. Se ekzistas perturbo de tiuj ekvilibroj plendoj estiĝas. La baza principo de Akupunkturo estas plibonigi la cirkuladon de la vivoenergio (nomata QI). La vivoenergio (QI) fluas per specifa komplika sistemo de kanaloj en nia korpo, la nomataj meridianoj. Per enigo de nadloj en specifaj lokoj sur la meridianoj la

Article submitted: 9.03.2016 Accepted: 30.05.2016

kuracisto klopodas plibonigi la vivoenergion kaj ĉesigi eblajn blokadojn. Ankaŭ en Ĉinio la malnova kuracarto konas ne nur kvar, kiel la Grekaj, sed kvin elementojn: Lignon, Fajron, Teron, Metalon kaj Akvon. La elemento de la astrologia lunjaro influas la korpon kaj vivon. Ankaŭ en la Homeopatio regas la sama principo. Oni ne sufice povas emfazi la principon de ekvilibro. Poste en la Okcidento venis aliaj modeloj krom tiuj de Galeno. En Nederlando Boerhave propagandis la klinikon al la lito de paciento (4). Ege grava persono estis la Germana kuracisto Karl Virchow (6). Li vivis dum la fino de la 19a jarcento. Li diris: "Medicino estas sociala scienco kaj la politiko estas nur medicino en pli granda skalo". Denove temas pri ekvilibro sed nun inter la individuo kaj lia ĉirkauaĵo. Li pensis ke por elradiki infektajn malsanojn kiel tifo aŭ ĥolero, politikaj reguloj estas pli necesaj ol medicinaj medikamentoj. Nuntempe kun la interesiĝo por ekologio, tia nova ekvilibro gajnas, ne nur por la nuna generacio sed ankaŭ por la futuraj. Alia aforismo de Virchow estis: Ĉiu kuracisto devas esti advokato de malriĉulo ĉar malriĉeco estas la kialo de malsanoj.

En nia lando Belgio ekzistas organizo de kuracistoj. Oni nomas ĝin "Orde der Geneesheren" aŭ esperante "Asocio de Kuracistoj". La leĝo devigas ĉiun kuraciston esti membro de tiu asocio. Sen esti membro li aŭ ŝi ne rajtas praktiki. Kial kaj kio estas la tasko de tia asocio? Ĝi gardas la kvaliton de la medicino por la populacio. La principo estas ke ĉiu medicina ago devas konformi l**a hodiaŭajn normojn kaj teknikojn**. Tio estas grava. La leĝdonantoj sciis ke estas ne eble priskribi ĉiun medicinan agon en leĝoj. Pro tio ili decidis ke elektita grupo da medicinistoj decidus ĉu medicinisto agas korekte konforme al la hodiaŭaj normoj kaj teknikoj. Unu magistrato estas enoficigita per la leĝdonantoj kaj devas kontroli ke ĉiu decido estas laŭleĝa. Kuracistoj ne ŝatas esti alvokataj al la asocio. La punoj estas en tri kategorioj: averto, suspendo por praktiki dum difinita tempo kaj la plej severa: ne plu praktiki dum la resto de la vivo. La plendoj venas de pacientoj sed ankaŭ de aliaj kuracistoj aŭ de la juĝistaro. Verŝajne similaj asocioj ekzistas en ĉiu lando. Ne eblas kontroli la kvaliton de medicina ago per personoj kiuj tute ne scias pri la evoluo de la medicino. Ekzemple mi ankoraŭ memoras la operacion pro katarakto de mia patro en la jaro sepdek de la antaŭa jarcento. Por ĉiu okulo li devis resti tri tagojn senmova en la lito kaj nur trinki supon. Poste li havis pezajn okulvitrojn kun alta dioptrio. Mi havis la saman operacion 30 jarojn poste: daŭris nur unu horo, mi povis reiri hejmen la saman tagon kaj la rezulto estas multe pli bona. Se oni nuntempe farus la saman operacion kiel ĉe mia patro la kirurgo preskaŭ certe ricevus riproĉon aŭ eĉ pli gravan punon de la asocio de kuracistoj.

La ĵuro de Hipokrato (1,2)

Ĉiun jaron en nia urbo la novaj kuracistoj kiuj ricevas la diplomon pri medicino devas esti registritaj en la asocio de kuracistoj. Estas granda manifestacio kaj la gepatroj kaj geamikoj kunfestas. La plej kortuŝa momento estas la ĵurado de la novaj kuracistoj. Laŭte ili kune legas la ĵuron de Hipokrato. Hipokrato de Kos vivis 400 jarojn antaŭ nia erao. Li estas universale rekonata kiel la patro de la okcidenta moderna medicino. Li uzis la modelon de Pythagoras sed pli grave la metodo estas bazita sur observado de klinaj simptomoj kaj raciaj konkludoj kaj ne estas bazita sur religiaj aŭ magiaj kredoj. Ĉi tie mi pridiskutas kelkajn artikolojn.

– Kiam nuntempe mi aliĝas al la medicina profesio, mi promesas ke mi ekagas laŭ mia plej bona povo por bonkvalita medicino favore al la servo de la proksimulo kaj de la socio.

Ne nur temas pri la individuo, la intenco etendiĝas al la socio. Kial? Medicino estas samtempe naturscienco kaj socia scienco. Logike la kuracisto devas serĉi la kialon de la malsano en la malsana korpo. Sed ofte li nur trovas la sekvojn kaj ne la kialojn. Tio estas eble logika: kuracistoj ne estas konsultataj por forpreni la kialojn sed por plimildigi la plendojn. Kontestado de la poluado, promocio de la trafiksekureco – estas subjektoj kiuj situas ekster la tereno de la medicino sed tamen havas grandajn efikojn sur la komuna sanstato. Medicino nuntempe enfokusiĝas al ĉiam pli malgrandaj strukturoj kaj procezoj en la korpo sed tro malmulte al la granda mondo ekster la individuo. Ĉu eblas la nuntempajn sanproblemojn ekstermi kiel antaŭe kun ĥolero kaj aliaj diareaj malsanoj kiuj estis tipaj por la 19a jarcento? En tiu tempo oni prenas "universalajn aranĝojn". Oni konstruis kloakajn kanalojn kaj provizadon de trinkakvo. La rezulto estis granda. Pro tio oni povas konkludi tri lecionojn. Unue, ne estas necese havi akuratan konon pri la veraj kialoj de la malsano por tamen preni bonajn preventajn aranĝojn. La kaŭzojn de diareaj malsanoj ne estis konataj en tiu tempo. Due, pasiva sanprotektado estas pli bona ol aktiva. Oni ankaŭ povas obteni sekuran trinkakvon per ĝia bolado antaŭ la uzado sed tiu

ŝanĝo de konduto estas multe pli malfacila. Kaj finfine, tiuj aranĝoj helpas ĉiun. Ekzistantaj diferencoj inter riĉaj kaj malriĉaj malaperis.

– Mi ados min instrui kompletige, mi ne superpaŝos la limojn de miaj eblecoj kaj kie eblas mi kontribuos al la progreso de la medicina kono.

Ni devas esti humilaj. Ĉu vere en la nuntempo la bio – kaj elektrokemia modelo sufice klarigas korpajn kaj mensajn procesojn? Ĉu ni ne havas la devon, ekzemple, klopodi integrigi la principojn de la ĉinaj meridianoj por akupunkturo? Ĉu tie la evoluo de la kono pri embriologio povas helpi? Mi revas ke Esperanto donas forumon por kompari kaj valortaksi la diversajn medicinmodelojn en la mondo. Eble UMEA demandas al ĉiuj kolegoj en la tuta mondo kolekti la diversajn modelojn, konataj en ĉiu lando. En dua stadio laborgrupo povas kompari kaj valortaksi la diversajn modelojn. Tiamaniere Esperanto helpus la evoluon de la homaro.

– Antaŭ ĉio mi prizorgas miajn pacientojn, ilian sanon properigi kaj ilian suferon mildigi.

Karl Virchov substrekis la influon de malriĉo. Malriĉo provokas malsanon, malsano provokas malriĉon. Ankaŭ en nia tempo Michael Marmot – angla epidemiologo – pruvis ke konduto kaj nutrado dependas de la edukado. Same por la enspezo, loĝo... . Mi pensas ke la laborsindikatoj faris pli por la malpliigo de la infanmortado ol la agoj de kuracistoj.

– Eĉ sub premo, mi ne uzas mian medicinan konon por praktikoj kiuj esti kontraŭaj al la humaneco.

Ĉu nuntempe vere? ĉiam? Mi pensas pri Guantanamo kaj aliaj lokoj kie kuracistoj tute ne prizorgas pacientojn sed kontraŭe agas kiel antaŭaj torturistoj por obteni informojn. Ĝis nun la internacia organizaĵo de kuracistoj ne sufice laŭte malaprobas tian agadon. Temas pri respekto. Estas unu el la plej gravaj temoj de la ĵuro.

– Mi atentos, ke mia konduto rilate al miaj pacientoj ne estas influata per vivokoncepto, politika konvinko, socia klaso, raso, etno, lingvo, sekso, seksa prefero, gento, aĝo, malsano aŭ handikapo.

Certe en Eŭropo nuntempe la politika konservativa kaj dekstra flanko gajnas influon. En mia lando (Belgio) la lingvo estas grava subjekto kaj zorgas por malegala traktado de homoj. En aliaj landoj estas etno aŭ seksa prefero. Kuracistoj devas agi por preventi la malutilon de pacientoj.

Por konkludi.

Tiuj estas por mi kelkaj gravaj artikoloj de la ĵuro de Hipokrato. En la futuraj jarcentoj, kiel en la antaŭaj jarcentoj, devas regi la samaj universalaj normoj kaj valoraj: Ekvilibro kaj Respekto.

Literaturo

1. Lichtenthaler Charles. Histoire de la medicine. Librairie Arthème Fayard. (1978) ISBN /2 – 213-00516-8
2. Lichtenthaler Charles. Le serment d'Hippocrate. Prelego en Antverpeno. (1981)
3. Histoire de la medicine. Encyclopedie Larousse. Librairie Larousse, Paris
4. Venzmer Gerhard. Fünftauzend Jahre Medicin. Carl Schünemann Verlag Bremen (1968)
5. Luuc Kooijmans.Voltaire, de man die de geneeskunde opnieuw uitvond. Liberales Gent (2012)
6. Kusters Ward. Rudolf Virchow. Tijdschrift "Gezondheidszorg en Vredesvraagstukken" Nederlandse Vereniging voor Polemologie. Postbus 199, 4190 CD Gerdermalsen (2-2016)
7. Anonima. Facetus, cum nihil utilius. Die bouc der Seden. (1290). Handschrift Koninklijke Bibliotheek Brussel

Noto

Mi ege dankas Ivo Durwael, subtenanto de nia klubo "La Verda Stelo" en Antverpeno por korekti la tekston kaj ankaŭ kolegon Christoph Klawe por la valoraj rimarkoj.